


ne estas tro disvolvigita regiono kaj nur ĉe la oceana bordo, inter vegetantaj tropikaj arbaroj, troviĝas plantejaj farmbienoj kaj sufiĉe grandaj urboj.

La interno de la regiono posedas forstojn forĵetantaj foliojn dum seka sezono de la jaro kaj »caatinga« — specifa tipo de la brazila savano. Ĉefaj signifoj de tiuj terenoj estas la paŝtado kaj parte la agrikulturo.

La projekto de la ŝosereta rekonstruado ampleksas 787 kilometrojn, inkluzive la vojfragmenton Aracaju-Maceló (206 km) kun ponto sur la rivero Sao Francisco; la vojfragmenton Ibó-Icó (278 km) kiu kompletigos la signifan vojlinion Salvador-Fortaleza kaj ebligos la eksporton de kultivita longfadena kotonono; la vojfragmenton Pasqueira-Salgueiro (302 km) kiu ebligos la elveturigon tra la haveno Recife kotonon, grenon kaj brutaron. Ankaŭ la vojoj Petrolina-Sao Luis, Sobral-Teresina kaj kelkaj aliaj ricevos solidan pavimon. La skiza mapo montras detalojn ligitajn kun rekonstruo de nord-okcidenta reto de brazilaj vojoj.

La regiono estos kunligota per bonkvalitaj ŝoseoj kun sud-brazilaj urboj, kiuj estos la ĉefa vendmerkato de la landa produktaĵo.



EL SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista,  
Vol. 20 (1969.), n-ro 3/4

911(049):Atlantis

## ATLANTIS: PLUAJ TEORIOJ

(D. B. Gregor, Northampton, Anglujo)

Sendube la artikolo de J. Chvosta en SR Vol. 20, n-ro 2 estos vekinta la apetiton de la legantaro por ekscii pli pri la mistera insulo. Tiun scivolemon mi provos kontentigi per citado el kelkaj antaŭnelonge aperintaj artikoloj [1].

La teorio de A. Schultan, laŭ kiu la rakonto rilatis Tartessus, lokon longe fabeligitan en la greka menso pro ĝia iam granda prospereco [2], trafas en la malfacilaĵon, ke oni malkovris nenian restaĵon de granda urbo ĉe la elfluejo de la Rivero Guadalquivir (antikve Baetis).

La nun ĝenerale akceptita teorio identigas Atlantison kun la insulo Kreto. Favore al tio indikas la jenaj faktoj:

1) Supozante, ke ĉiu ŝajne fabela rakonto baziĝas sur iu historia okazaĵo, ni serĉu ion, kio povis kaŭzi la subitan malaperon de granda urbo. Evidente, tio devus esti vulkana erupcio, kia detruis Pompejon. Nu, estas pruvite, ke ĉirkaŭ 1500 a. K. okazis en la egea insulo Santorin (antikve Thera), terura vulkana eksplodo, kies elĵetaĵoj ankoraŭ troviĝas, kiel sur la insulo mem, tiel ankaŭ sur la ĉirkaŭa marfundo. Pro tio, ke la mirinda minoa civilizacio de Kreto ĝuste tiam malaperis, kun la detruo de ties ĉefurbo Knoso, oni emas, sekvante S. Marinatos, kunligi la du okazaĵojn kaj supoziti, ke la erupcion akompanis granda tertremo kaj marondo, kiuj detruis Knoson kaj tiel permesis al ĝiaj micenaj vasaloj okupi la insulon [3]. Tiu lasta okazaĵo aperas en la platona rakonto kiel la venko de la atena armeo super la Atlantisanon.

2) La plej fabela ero en la rakonto estas la ciferoj. Se ni supozas konfuzon ie laŭlonge de la tradicio, tiel, ke oni parolis pri miloj anstataŭ pri centoj, kaj se ni dividas laŭe per dek, ni ricevas tute senchavajn ciferojn: la dato fariĝas 900 jarojn antaŭ Solono, kio lokas nin ĝuste ĉ. 1500 a. K., kaj la dimensioj de la ebenaĵo fariĝas 300 x 200 stadioj, kio taŭgas por la kreta tiel nomata Mesara.

3) La fabele grandaj ciferoj estas tio, kio devigis Platonon loki sian Atlantison en la Atlantikon, ĉar tiel grandega insulo ne povis troviĝi en la Mediteraneo. Do tiu lokado forfalas.

4) Sed Platono ankaŭ diras, ke la insulo estis »pli granda ol Libio kaj Azio«. Pro tio, ke li aldonas »kune« nur en la dua el siaj du verzioj, kaj plue, ke neniu sciis, kiel grandaj estas tiuj du regionoj, oni rajtas suspekti eraron. Tial P. B. S. Andrews supozas [4], ke Platono mislegis sian fonton (antikvan manuskripton skribitan per malnova alfabeto) kaj kopiis »pli granda (ol)« anstataŭ la samaspekta »mezvoje (inter)«, kiu vorto lokus la insulon ĝuste tie, kie troviĝas Thera.

5) W. Brandenstein vidas similecojn inter la virbov-oferado priskribita en la platona **Kritias** kaj scenoj el la minoa arto.

6) La nomo Kleito povas deveni el tio, ke Solono misaŭdis aŭ miskomprenis la egiptajn pastrojn, kiam ili diris, ke ĉiuj reĝoj de la insulo devenis de mardio kaj ties edzino, la Sinjorino Kretu (**Krit.** 113 d).

Tiamaniere historia okazaĵo iom-post-iom aliformiĝis en fabelon, parte pro simplaj eraroj, parte pro la forteco de la homa imagpovo, en epoko, kiam mankis dokumentoj kaj scienca esplorado.

## NOTOJ

[1] Utila resumo en **Proceedings of the Classical Association**, 1958.

[2] Tartessus (apud Cádiz), fenica kolonio, estis la Eldorado de la antikva mondo, famekonata pro siaj »orportantaj fontoj« (Strabo 148) kaj aliaj metaloj (ib. 146), kaj ankaŭ pro la longviveco de sia reĝo, Argantonio, kiu mortis ĉ. 550 a. K. je la aĝo de 120 jaroj. Efektive en 1958 oni malkovris en la apudeco de Sevilla oran trezoron. Iuj identigas Tartessus kun la biblia Tarŝiŝ, kien Jona volis eskapi; sed 2 Kron. 9,21 signifas nur, ke la tarŝiŝaj ŝipoj konsistigis tiam la komercan floton, kiu dungiĝis por la transporto de varoj, inkl. oron, el la oriento; kaj la vort **tarŝiŝ** verŝajne estas fenica vorto por **rafinejo**, kun aludo al la fenicaj kupronrafinejoj en Hispanujo kaj Sardlando.

[3] SR Vol. 12, p. 98.

[4] **Greece and Rome**, April 1967.

## INDEKSOJ POR VOLUMOJ 11—20 DE SCIENCA REVUO (M. Marković, Beograd, Jugoslavio)

La unua nombro estas la numero de la volumo, ĝin sekvas la paĝnumeroj — ĝis la punktokomo, kiu disigas la volumnumerojn.

### I Indekso de personoj (aŭtoroj kaj aliaj)

- |  |   |
|--|---|
| Albault A. 11,74,89; 13, 38; 14, 3;<br>17, 37; 18, 81; 19, 105; 20, 17, 81 | Haferkorn R. 11, 45, 120; 12, 12, 111;<br>14, 18, 74, 81, 140, 142; 15, 7, 23,<br>25, 59, 64, 108; 16, 40, 73, 135;<br>17, 72; 18, 112, 115; 19, 40, 147;<br>20, 39, 141. |
| Adcock C. J. 11, 98; 12, 36  | Hallwachs 11, 70  |
| Armand D. L. 13, 80, 84; 15, 3; 20, 93.                                    | Halvelik M. 17, 83  |
| Baldan Adrian 15, 99   | Hansen Ethel 11, 115  |
| Bara Modesto 11, 46  | Hauptenthal R. 19, 71, 77   |
| Belov A. 20, 13  | Harry Ralph 18, 49  |
| Blazquez Felix Garcia 18, 41; 19, 3,<br>95; 20, 65                         | Heck A. 20, 115   |
| Boev S. 18, 33   | Hertz Henriko 11, 70  |
| Bogatyrev B. M. 20, 33   | Häg Erik 13, 63   |
| Boulton Marjorie 11, 152   | Jelinek Miloš 16, 85  |
| Butler M. C. 11, 90  | Jelenc F. 16, 105   |
| Ciliga Paul 12, 38   | Kapusi A. 17, 21; 18, 93; 19, 17  |
| Chvosta Josef 17, 17, 59, 113; 18,<br>21, 89; 20, 73                       | Kavka J. 16, 13   |
| Csögör I. 17, 21   | Kääriäinen Erkki 13, 102  |
| Čahotin Sergej 14, 54  | Klang Carl 11, 13   |
| Daim Wilfried 17, 93   | Kohen-Cedek J. 11, 104  |
| Dobrzynski M. 17, 105  | Kozamernik Marija 12, 86  |
| Egami F. 11, 5   | Kossakowski Miroslaw 16, 69; 18, 25;<br>20, 129   |
| Einstein 11, 70  | Kulcsár Aleksandro 19, 113  |
| Ehrenberg Wolfgang 14, 119; 15, 35,<br>109; 17, 135                        | Lapenna Ivo 13, 17, 67  |
| Falla M. E. 19, 9  | Lewin A. Ralph 15, 117; 17, 33, 65;<br>19, 73   |
| Filčakov P. F. 20, 125.  | Lewin Maurice 15, 71  |
| Franck 11, 70  | Lienhardt A. 14, 15; 17, 139;<br>18, 3, 120   |
| Fréchet Maurice 11, 2  | Linse R. 12, 45; 14, 13   |
| Gregor D. B. 11, 91; 20, 131.  | Linton K. G. 15, 65   |
| Girard R. 14, 127.   | Lu Chin-sheng 12, 48  |
| Gugleminetti Clelia Conterno 20, 3   | Mabesoone J. M. 14, 65  |